



Mesaĝo de Universala Esperanto Asocio okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, la 24-a de oktobro 2026

La Tago de Unuiĝintaj Nacioj, la 24-a de oktobro, markas la daton en 1945 kiam fondiĝis Unuiĝintaj Nacioj, dum venadis al fino la Dua Mondmilito kaj la streĉa resaniĝa procedo estis komenciĝanta. La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj listigas la kvar celojn de la organizo:

1. Konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon,
2. Evoluigi inter la nacioj amikajn rilatojn,
3. Realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn,
4. Esti centro por harmoniigi la klopodojn de la nacioj por atingi tiujn komunajn celojn.

Tiu spirito de kunlaborado estis kaj estas konstante kontestata sed daŭre pluvivas. Ĝi dependas de la kolektiva bona volo, de certa nivelo de reciproka konfido, de preteco aŭskulti kaj ne nur agi.

En epoko kiam, pli ol iam antaŭe, ekzistas bezono preferi kolektivan bonfarton super strikta meminteresiĝo, kaj kiam kunparolado, kunaŭskultado kaj kuna agado estas konstante minacataj, nia Asocio (la Universala Esperanto-Asocio) restas fidela al la serĉado de internacia kompreniĝo esprimata en la Ĉarto de UN kaj la similaj idealoj enkorpigita en la Internacia Lingvo Esperanto.

Parolantoj de Esperanto tra la tuta mondo gratulas Unuiĝintajn Naciojn je ĝia okdekunua jaro kaj alvokas ĝiajn membrajn ŝtatojn kune labori por la bono de ĉiuj kaj la bonfarto de la internacia komunumo.